reta propagando pri Esperanto estas en rekta proporcio al la kvanto da meterialo enretigita. Ju pli da pri- kaj perEsperanta materialo en la reto, kaj ju pli da temoj estas pritraktaj per ĝi, des pli da personoj povas trovi ion el ĝi kiam ili serĉos ion en Interreto, kaj ekscii pri la internacia lingvo dank' al la eventuale trovita Esperanta materialo.

Sed estas tre malgranda la kapablo de nia E-grupo por enretigi tekstojn, informojn, eseojn, artikolojn… Por tiu tasko, nia E-asocio bezonus sufiĉe ampleksan teamon da spertaj informadik-fakuloj kapablaj ellabori ttt-paĝojn, aŭ almenaŭ, sendantojn de esperantigitaj tekstoj jam surbendigitaj, ekzemple sendataj al ni per retpoŝto, tiel ke oni ne devu tajp-skribi ilin. Pri kiuj temoj? Pri ĉiuj ajn temoj ĉar interesas ke en la reto ekzistu ĉiutipa Esperanta materialo. Sed, se konkretigi, taŭgas recenzoj de filmoj kaj libroj, artikoloj pri aktualaj temoj, prihistoriaj raportoj… Oni sin detenu pri materialoj kiuj jam ekzistas esperantlingve en la reto; estus sensencaĵo ripeti alies laboron.



Zamenhofa Tago de la jaro 2008

Foje nia E-grupo ricevas viziton de foraj samideanoj. En la jarcenta historio de nia E-rondo, kiun ni prezentas en ĉi tiu numero de la revuo. oni mencias multajn el tiuj vizitoj. Ĉi jare, Komence de la somero vizitis nin iu germana esperantisto, Rudolf Fischer. Li jam estis farinta similan viziton pasintjare. Li estis survoje al Kompostelo kune kun neesperantista samlandano. En Oviedo renkontiĝis kun li du membroj de **Astura Esperanta Asocio**: Carlos E. Carleos kaj Faustino Castaño. Kiel kutime okazas en la renkontiĝoj de esperantistoj el malsamaj landoj, lingvoj kaj kulturoj, tuj okazas en la kunvenanta grupo la miraklo de la interkomunikado. Interkomunikado kiu ne eblas, aŭ tre ege malfacilas, inter neesperantistoj kun malsama gepatra lingvo. Ni interparolis, sen la lingva baro, pri diversaj aferoj, la celo de lia vojaĝo, lia sperto de antaŭaj similaj vojaĝoj en nia lando kaj en aliaj lokoj… Kun ĝojo, kaj envio, ni aŭdis lian informon pri la bonstato de la esperantista movado en lia urbo.


Germana E-isto kun asturaj samideanoj

Ne tiel bona estas la stato de la esperantista afero ĉe ni, sed ni devas klopodi venki ĉiujn malfacilaĵojn en la disvastigado de Esperanto. Kaj tiu disvastigado efektiviĝas per lerno-kursoj. Tial, estas interese por ni anonci nun la organizadon de novaj Universitataj kursoj de Esperanto en nia regiono. Antaŭ pluraj jaroj estis en la Universitato de Oviedo Esperanto-kurso organizita kaj gvidita de Doktorino María José Álvarez Faedo kaj Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime. Nun, tiuj samaj gesamideanoj planas okazigi, ne unu, sed du novajn Universitatajn E-kusojn, unu en Oviedo kaj alia en Gijón por la lerno-jaro 2009-2010. En la sekva paĝo ni prezentas la oficialan anoncon de la Universitato pri la kurso planita por Gijón, kiun gvidus Carlos E. Carleos. Tiu de Oviedo, kiun gvidus María José Á. Faedo, estus laŭ samaj kondiĉoj. Ni esperu ke multaj gestudentoj interesiĝos pri la afero. Kiel dirite, tiuj kursoj havas Universitatan rangon; tio signifas ke, se ili okazos, tio estos sendepende de la kursoj kiujn ni povos organizi, kiel kutime, en la ejo de nia E-grupo por ĉiutipa gelernantaro.

Kiam komenciĝas la dua jarcento de la esperantismo en Gijón, ni devas esti pretaj fari ĉion eblan por ke en la estonteco la internacia lingvo prosperu, ene kaj for de nia urbo, ĝis sukcesi ludi la rolon de universala interkomunikado por kiu ĝi estis kreita.